# PARIZA FEDERACIO

FEDERATION PARISIENNE des CENTRES CULTURELS "ESPERANTO"

CCP 10482-04 Paris    4bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS    tél 278 68 86

MARTO - APRILO 1975    Nº 14

D I M A N Ĉ O N  L A  9 - an  D E  M A R T O  1 9 7 5 - a

( p o s t t a g m e z e )

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

K O N G R E S O  D E  L A  P A R I Z A  F E D E R A C I O

SALLE DES FÊTES MUNICIPALE : 30, rue de la Libération - ENGHIEN-LES-BAINS -(95) -

DUONTAGA KONGRESO.........S E D ........NE DUONKONGRESO !

Tiu kongreso ne havos la kutiman formon. Efektive, pro rezigno de la restoracimastro, ne trovante taŭgan anstataŭanton la organizantoj estis devigitaj modifii la programon. Ne okazos komuna manĝo. Nur kulpas la nunaj ekonomiaj cirkonstancoj.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

P R O G R A M O

I4.30 H. Varietea ESPERANTO posttagmezo

16.10 H. Ĝenerala Asembleo de la Pariza Federacio

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Bonvolu sendi vian aliĝon kun 15 frankoj al:

Fédération Parisienne Espéranto
4bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS

CCP 10 482 - 04 P A R I S *****

Se vi venos aŭtomobile, vi trovos parkejon apud la kongresejo
Se vi venos per trajno, Stacidomo "Gare du Nord". La trajno de 14.00 H. permesos al vi esti akurata por la kongreso.

Grava informo : Laŭ la statutoj rajtos voĉdoni la membroj abonantaj pagintaj la kotizon 1975, bonfarantaj, donacantaj, dumvivaj.

La materialo necesa por voĉdoni troviĝas sur suplementa folio, sendata nur al la eventualaj voĉdonontoj.

Kiel kutime vi devos voĉdoni por UFE kaj por la Pariza Federacio.

Se vi ne povas ĉeesti la kongreson vi povos sendi VOĈDONILOJN kaj RAJTIGILON tiumaniere:

a) - metu la voĉdonilon en blankan koverton sen iu ajn indiko

b) - fermu tiun koverton kaj metu ĝin kaj la rajtigilon en alian koverton ,sur kiu vi skribos vian nomon.

c) - sendu la tuton al "Pariza Federacio" 4bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS .Ke ĝi alvenu antaŭ la 7-a de marto 1975.(afranku per 0,80 F.-poŝtmarko por akceli la alvenon)

ĈIUJ EN ENGHIEN - LES - BAINS la 9-an de marto 1975-a.......Bonega okazo por montri vian intereson al E S P E R A N T O ! ! !

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

APPEL AUX RETARDATAIRES : Le prochain bulletin sera envoyé aux seuls membres ayant réglé la cotisation 1 9 7 5 .

oooooooooooooooooooooo
oooooooooooooo
oooooo

1°) - <u>MORALA RAPORTO</u> - La 16an de Marto 1974 estis elektita la nova estraro de la Pariza Federacio: Prezidanto: S-ro Roger DESPINEY, vic-prezidantoj: S-roj Jean GUILLAUME k. Etienne GAUDRY, kasisto: S-ro Jack ROUSSEAU, Sekretario: Michel DELATTE. La aliaj konsilianoj estas: S-ino AMARIGLIO, F-inoj CLAUDE k. PLANTIVEAU, S-roj BENAZECH, BOURDEAUX, Dominique DESPINEY, DOURY, HENRY, PERAYk. THIERRY.- En I974 la membraro atingis 271 anojn k. montras progreson, ĉar lastjare ĝi estis 244.- La federacia kongreso, tute bone organizita de skipo "RENAISSANCE & CULTURE", okazis en Sainte-Geneviève-des-Bois la 10an de Marto. - La Tri-Reĝa-Kuko-kunvenon organizis la Grupo de Parizo la 19an de Januaro, rue des Petits-Hôtels kun kabareta vespero. - Okaze de la federacia kongreso "ESSONNE-ESPERANTO" prezentis bonegan ekspozicion pri Esperanto. - La 21an de Aprilo F-to MARMOU vizitigis en LA Houssaye-en-Brie siajn abelujojn kaj la priorejon. - La 18an de Majo estis Eksterordinara Ĝenerala Asembleo por aprobo de ŝanĝoj en la statutoj de nia asocio pro la translokiĝo de la sidejo. - La 19an de Majo la Grupo de Bourg-la-Reine organizis viziton de la Kastelo de Sceaux; post tiu vizito UEA-delegitoj de la Pariza regiono kunvenis. La 9an de Junio S-ro KRAEMER gvidis promenadon tra la arbaro de Saint-Germain.-En Septembro pluraj anoj vizitis Ekspozicion pri Informatiko (SICOB), kie P-ro FRANCK prezentis ROBBIMAT-aparaton funkciantan per Esperanto-programo.- En Septemrbo k. Oktobro okazis ĝemeliĝaj ceremonioj en LE PERREUX k. FORCHHEIM (Germanujo), kie esperantistoj de Le Perreux k. Nurenburgo vigle propagandis por Esperanto.- De 3a ĝis 7a Oktobro la grupo de Le Perreux, okaze de 2a OMAC-Festivalo, deĵoris en sia stando, kiu estis vizitata de ĉ. 1500 personoj. Plie antaŭ publiko estis farita prezento de Esperanto. - La 9an k. 10an de Novembro S-ro Jack ROUSSEAU prezentis en Le Perreux 4 filatelajn panelojn, kiuj ricevis medalon kiel rekompencon. La grupo de Rueil-Malmaison prezentis la SAT-ekspozician materialon pri Esperanto (30 NOV; k. 1 DEC;).- Kursoj okazis en Bourg-la-Reine, Le Perreux, Parizo, Rueil-Malmaison, Sainte-Geneviève-des-Bois. -S-roj CAMPAN k. SAUDIAN-ROUSSEAU intencas starigi novan grupon respektive en S$^{t}$-Mandé k. Enghien-les-Bains, kie okazos en 1975 la federacia kongreso.

La federacia sekcio de JEFO kunvenis en Mantes-la-Jolie k. preparas en tiu sama loko paskan kunvenon en 1975. - Nia juna federaciano Patrick DEVEUGHELE nun oficiale prizorgas la rilatojn inter ne-k.-esperantistaj skoltoj.

Prezidanto: Roger Despiney

2°) - <u>FINANCA RAPORTO</u> (compte rendu financier)

| | DEBIT | CREDIT |
|---|---|---|
| Bulletin fédéral | 681,45 | |
| Cotisations 1974 | | 827,00 |
| Cotisations 1975 | | 42,00 |
| Dons | | 56,00 |
| Frais généraux | I79,70 | |
| G.E.E. | | 10,00 |
| Groupe de Paris | | 60,00 |
| Congrès 1974 | | 249,95 |
| Congrès 1975 | 6,00 | |
| Subvention (D$^{ion}$ Enseig$^{t}$ de la Seine) | | 1000,00 |
| U.F.E. 1975 | | 1018,00 |
| | 867,15 | 3262,95 |
| Caisse d'Epargne | 684,00 | |
| Chèques-postaux | 4333,85 | |
| Membres à Vie | | 684,00 |
| Fonds propres | | 1938,05 |
| | 5885,00 | 5885,00 |

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

<u>B I L A N</u>

| | | | |
|---|---|---|---|
| Caisse d'Epargne | 684,00 | Fonds propres | 3209,85 |
| Chèques-postaux | 4333,85 | Membres à Vie | 684,00 |
| Congrès 1975 | 6,00 | Cot. fédér. 1975 | 42,00 |
| | | G.E.E. | 10,00 |
| | | Groupe de Paris | 60,00 |
| | | U.F.E. | I018,00 |
| | 5023,85 | | 5023,85 |

Paris le 6 janvier 1975: le trésorier: Jack Rousseau

## VORTOJ DE LA PREZIDANTO

-o- Estas malfacile trovi taŭgajn kunlaborantojn por agadi en nia Esperanto-Movado. Preskaŭ ĉiam vi aŭdas la saman respondon : "Mi ne havas tempon". - Mi opinias, ke la argumento eltirita de la manko da tempo estas plej ofte nur preteksto; preskaŭ neniam ĝi rezistas al serioza enketo.

-o- Grumblanto : "La gejunuloj ankoraŭ montras sian malbonan spiriton. Vidu: ili organizas sian JEFO-kunvenon en Mantes-la-Jolie precize, kiam UFE kongresos en Tours !"

Mi :"Permesu, ke mi klarigu al vi la aferon. Por ne ĝeni UFE-n, kiu intencis pentekoste kongresi, JEFO elektis paskan kunvenon kaj startis la organizon de sia afero. Poste, UFE ŝanĝis la daton de sia nacia kongreso kaj adoptis la daton de la JEFO-aranĝo. Do, JEFO ne kulpas! Kara Grumblanto, mi rimarkas, ke ofte vi kritikas la esperantistajn gejunulojn. Diru al mi : Kiam vi malkovris Esperanton ?"

Grumblanto : "Mi estis kvindekjaraĝa" .

Mi :"Do, vi ne rajtas grumbli kontraŭ gejunuloj, kiuj pli junaj ol vi komencis labori por Esperanto. Ĉu ne ?" .

-o- Tro malmultaj kursgvidantoj instruas Esperanton. Kial?. - Multaj bonegaj esperantistoj povus gvidi kurson kaj ne faras tion. Ĉu manko da kuraĝo, da fido, de idealo ? Ĉu ili ignoras la kondiĉojn por esti bona kursgvidanto ? Jen la ĉefaj kondiĉoj :
a)- Ami Esperanton. b)- Ami transdoni ĝin. - c)- Ami siajn gelernantojn...kaj ne fari kurson por montri sian superecon, sed humile, paŝo post paŝo, tute simple instrui nian belan lingvon.

Roger Despiney

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

### N I A J   A N O J

-o- S-ro NELS, 80-jaraĝa, fariĝis en OKtobro 1974 praavo de la eta Natalia. Gratulojn!

-o- Inĝ-ro AISBERG vojaĝis en aŭtuno 1974 al Sovetunio, kie li en Odeso renkontiĝis kun Sergej Rublov, konata figuro en la soveta movado inter la du mondmilitoj.

-o- S-ro KRAEMER perdis sian edzinon kaj nun loĝas en la Orienta Federacio. Kun niajn kondolencojn ni sendas al li niajn gratulojn por la bonaj laboroj faritaj de li en la Pariza federacio, ĉu promenante nin en la arbaro de Saint-Germain-en-Laye, ĉu partoprenante la translokigon de la UFE-sidejo.

### FONDUSO-MATERIALO ***

-o- Tiu fonduso estas destinita al pago de la modernaj sed kostaj reprodukto-maŝinoj aĉetitaj de UFE. Bonvolu sendi vian donacon al UFE 4bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS CCP 855-35 Paris.

### A S O C I O   J E A N

-o-Ĝia pariza grupo invitas vin mardon 8-an de Aprilo je la 19.30 en Librejo Aryana 1-a etaĝo, 18, rue des Quatre-Vents PARIS. S-ro J. THIERRY parolos pri la temo : "Pour une langue commune? Les préjugés !"

### K O T I Z O J - 1 9 7 5

-o- Ne plu prokrastu la sendon de via kotizo. Vidu la kotiztabelon en la lasta bulteno. Antaŭajn dankojn !

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Fikse rigardi la celon......estas bone !

Kuraĝe marŝi al ĝi. . . . . estas pli bone !

Feriu en la
ESPERANTISTA KULTURDOMO
kastelo Grésillon, 49150 BAUGE

En famkonata turisma regiono

En bela, komforta kastelo, meze de parko 17-ha

En amika etoso, vi scios kio estas Esperantujo!

PASKAJ FERIOJ: de 22-an de Marto ĝis 5-an Aprilo

SOMERO : de 1-an de Julio ĝis 1-an de Septembro

Rapide aliĝu al Esperantista Kulturdomo

Kastelo Grésillon, 49150 - Baugé .

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

### P o u r   f a i r e   p r o g r e s s e r   p l u s   r a p i d e m e n t   n o t r e   CAUSE !

-o-o-o-o-o-o-o-o-

Lorsque vous parlez à quelqu'un de l'Espéranto, souvent votre interlocuteur est étonné d'apprendre autant de choses à son sujet. Assez rapidement il conclue que l'Espéranto devrait être enseigné dans les écoles. Ma réplique est toujours la même: Pour arriver à cela il faut que l'opinion publique soit sensibilisée au fait ESPERANTO...ensuite agiront les gouvernements.

Comment toucher l'opinion publique? Il faut utiliser les grands moyens de communication : télévision, radio, presse, oeuvres littéraires primées, chansons populaires, etc...

Puisque nous ne sommes pas riches il faut trouver les moyens pour pénétrer les "mass-media". Je vous donne page suivante un exemple d'intervention auprès d'un important journal national

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

qui a abouti à un article sur l'Espéranto lu par plusieurs dizaines de milliers de personnes.

---

*** " Le Journal LA CROIX - 29 janvier 1975 "

L' ESPERANTO A 87 ANS

M. Roger Despiney, secrétaire de l'Association catholique française pour l'Espéranto nous écrit après avoir pris connaissance de l'article "Le colloque international - Langues et construction européenne" (LA CROIX du 10 décembre) :

- - - - - -

Cet article fait resurgir le problème du choix d'une ou de plusieurs langues de communication internationale. Une fois de plus, il faut constater combien l'espéranto est méconnu. Souvent ceux qui le jugent ne le connaissent pas et le rejettent par une affirmation erronée comme celle qu'on a pu lire dans l'article sus-mentionné : "L'espéranto ne serait que le véhicule d'une pensée appauvrie". Une telle assertion est infirmée par de nombreux faits et témoignages.

Depuis quatre-vingt-sept ans qu'il existe, l'espéranto est devenu une véritable langue vivante possédant une exceptionnelle richesse d'expression prouvée autant par les multiples traductions de chefs-d'oeuvre de l'humanité que par les oeuvres littéraires écrites dans cette langue.

A l'occasion des Congrès annuels universels d'espéranto, des hommes de tous pays se comprennent sans intermédiaire, suivant des conférences traitant des sujets les plus divers. L'important à souligner est qu'ils sont mis sur un pied d'égalité, ce qui est rarement le cas lors de l'usage d'une seconde langue étrangère.

D'éminents linguistes comme Antoine Meillet, Mario Pei et André Martinet ont estimé valable l'espéranto. Ce qui caractérise cette langue, c'est la simplicité, la régularité, la clarté et la stabilité. De plus, elle présente une incontestable valeur pédagogique et éducative et son adoption dans les programmes scolaires constituerait une victoire du bon sens.

Une preuve pratique en a été donnée cette année même : l'espéranto a été enseigné pendant trois ans dans 26 classes d'écoles élémentaires d'Autriche, de Bulgarie, de Hongrie, d' Italie et de Yougoslavie. L'acte final a été la rencontre d'une partie des enfants concernés à Primošten (Yougoslavie), du 25 juin au 2 juillet 1974. Le résultat a été des plus encourageants. La langue a fonctionné parfaitement. Les enfants ont acquis le sens de l'amitié internationale autant qu'un plus grand goût pour l'étude de leur propre langue et pour celle des langues étrangères.

L'espéranto pourrait donc devenir le support linguistique qui faciliterait l'étude des langues étrangères tout en assurant la sauvegarde des cultures qu'elles véhiculent.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

## KALENDARO

MARTO - AŬGUSTO 1975

| | |
|---|---|
| MARTO | |
| 9 | PARIZA FEDERACIA KONGRESO EN ENGHIEN-LES-BAINS |
| 22 | Konsilia kunveno, ĉe Cerisaie je la 14.45 H. |
| 27/2 APR | Renkontiĝo de J.E.F.O. en MANTES-LA-JOLIE (aliĝu ĉe Cerisaie) |
| 29-31 | NACIA KONGRESO DE U.F.E. EN TOURS |
| MAJO | |
| 10 | Konsilia kunveno, ĉe Cerisaie je la 14.45 H. |
| 17-19 | Kongreso de Franca Katolika Esperanto Asocio en LILLE |
| JULIO | |
| 26/2 AŬG | UNIVERSALA KONGRESO DE U.E.A. en KOPENHAGO (Danlando) |

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

La materialo de la venonta bulteno nepre devos alveni antaŭ la 21-a de aprilo al :
R. Despiney 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *
* * * * * * * * * * * * * * * * * * *
* * * * * * * * * * * * * *